

Heinrich Heine,
 [Ne scias mi, kio okazis]
tradukita de Paul Gottfried Christaller

El la "Libro de la kantoj", parto "La Reveno".

Ne scias mi, kio okazis
 al mia tristema kor':
 Antikva legendo min kaptis,
 ne cedas el mia memor'.

La Rejno fluadas trankvile
 murmuras kiel mister',
 la supron ŝonegan orumas
 sunbriloj de la vesper'.

Plej bela virgino jen sidas
 mirinda sur la montet'
 kaj ŝia oraĵo radias,⁴
 ŝi logas kiel magnet'.

Ŝi kombas la oran hararon
 abundan per ora kombil',
 kantante misteran lidon,⁵
 ravantan kiel sunbril'.

...

Heinrich Heine,
 Lorelej
tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof

Ne scias mi, kial subita
 malgaj' en la koro naskiĝis;
 el tempo jam enterigita
 legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,
 la Rejno mallaŭte babilas,
 per oro de l'sun' en vespero
 la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:
 en ora ornamo brilante,
 sur supro de l' monto ŝi sidas,
 la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas
 kaj kantas tra l' pura aero,
 kaj forto mirinda sin trovas
 en tiu ĉi kant' de l'vespero.

...

Heinrich Heine,
 The Lorelei
tradukita de L. W. Garnham

I do not know what it signifies.
 That I am so sorrowful?
 A fable of old Times so terrifies,
 Leaves my heart so thoughtful.

The air is cool and it darkens,
 And calmly flows the Rhine;
 The summit of the mountain hearkens
 In evening sunshine line.

The most beautiful Maiden entrances
 Above wonderfully there,
 Her beautiful golden attire glances,
 She combs her golden hair.

With golden comb so lustrous,
 And thereby a song sings,
 It has a tone so wondrous,
 That powerful melody rings.

...

⁴En la sube menciiita kajero, el kiu mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi esperantigon, la linio tekstas: "kaj sia oraĵo radias", kun "sia" anstataŭ "ŝia". Tio ŝajne estas aŭ pres-eraro aŭ gramatika eraro de la tradukinto.

⁵En la origina versio troviĝas tie ĉi la vorto "liedon", kio estas aŭ pres-eraro aŭ neologismo inventita de la tradukinto Paul Christaller.

Ŝipisto en sia ŝipeto
kaptiĝas per stranga dolor',
la rifon li tute ignoras.
atentas nur ŝin kun fervor'.

Mi kredas: la ondojenglutas⁶
ŝipiston, ŝipeton je l' fin',
kaj kulta pri tio nur estas
kantado de la virin'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de PAUL GOTTFRIED CHRISTALLER (*1860-08-21 – †1950-12-31).*

Arg-2-1116 (2010-09-13 10:03:39)

Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun ĉi tradukon el la libreto "H. Heine - Libro de Kantoj", eldonita en 1911 de la "Esperanto-Propaganda Instituto" (Leipzig, Kaiser-Wilhelm-Str.15), 2a eldono. [Sur la frontpaĝo de la kajero estas malsupre indikita ankaŭ: Eldonejo Rothermel, Friedrichswerth (Thüringen) kaj supre: Popola Biblioteko Esperantista n-ro 2.] Die deutsche Urfassung von Heinrich Heine siehe: "Buch der Lieder", Abschnitt "Die Heimkehr". - Informoj pri la tradukinto Paul Christaller troviĝas en la vikipedio retejo http://de.wikipedia.org/wiki/Paul_Gottfried_Christaller, kun foto de li.

Ŝipet' iras sur la rivero,
ŝipisto ektremis de l' kanto,
kaj blinda por ĉiu dangero
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela
perdiĝis sub l' akvoturnado;
ĝin Lorelej' faris kruela,
per sia mirinda kantado.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, *1859-12-15 – †1917-04-14).*

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.

The shipper in the little ship
It effects with woe sad might;
He does not see the rocky slip,
He only regards dreaded height.

I believe the turbulent waves
Swallow the last shipper and boat;
She with her singing craves
All to visit her magic moat.

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 – †1856-02-17) en la Anglan de L. W. Garnham.*

Arg-2-14 (2003-10-11 23:04:57)

L.W. Garnham, Bachelor of Arts, LEGENDS OF THE RHINE; mentioned in: A Tramp Abroad. Vol 1-2. Leipzig: Tauchnitz, 1880 Band I, Mark Twain 1880

⁶Mi, Manfred Retzlaff, enmetis la duoblan punkton post la vorto "kredas". Ĝi mankas en la origina traduko de Paul Christaller.